§

# Jura Semajno

Semajna bulteno de Internacia Jurista Esperanto-Asocio

Novembro : 2 2021

## 96-jaraĝulino akuzita en Germanio

S-ino Irmgard Furchner, 96-jaraĝa kaj eksa sekretariino en la ekstermejo de Stutthof, deklaris ĉe germana tribunalo sub la akuzo esti komplico en la murdo de pli ol 11.000 homoj. Unuamomente S-ino Furchner pruvis fuĝi, tamen li estis haltigita kaj ekde tiam policano akompanas ŝin el la maljunulejo kie ŝi loĝas ĝis la tribunalo por deklari, same elektronika braceleto kontrolas ŝin. Kurioze, la tribunalo kie ŝi deklaras estas la Tribunalo por ne-plenaĝuloj, pro la fakto, ke kiam ŝi laboris en la ekstermejo ŝi ankoraŭ ne estis 18-jaraĝa.



*S-ino Irmgard Furchner antaŭ la Tribunalo*

Antaŭ la Tribunalo S-ino Furchner nenion deklaris, laŭ ŝia advokato, S-ro Wolf Molkenin, la eks-sekretariino respondos nenian demandon. Ŝi estas akuzita kunlabori okaze de la murdigo de pli ol 11.000 homoj en la nazia ekstermejo de Stutthof, proksime al la pola urbo Gdansk. Laŭ historiistoj, en tiu koncentrejo nazioj murdis 65.000 homojn.

La akuzito laboris tie kiel tajpistino inter la jaroj 1943 kaj 1945. Jam en la jaro 1954 oni pridemandis ŝin, tiam ŝi asertis, ke ĉiujn komunikaĵojn inter la respondeculoj de la ekstermejo kaj la ĉefa oficejo de la nazia organizo SS, ŝi ricevis. Krome, ŝi tajpis ĉiujn leterojn senditajn de la ekstermejestro al Berlino. Inter tiuj informoj troviĝis ĉiutagaj etatoj kun la nombro de murdigitoj. Malgraŭ tio, S-ino Ruchner tiam asertis, ke en ŝia labor-loko en la ekstermejo ŝi nenion sciis pri la murdoj tie okazintaj.

Okaze de proceso kontraŭ eblaj respondeculoj de tiuj murdoj, S-ino Furchner deklaris unuamomente kiel atestanto, tamen antaŭ kvar jaroj oni akuzis ŝin kiel eblan komplicon. Dum la unua sesio, la akuzito ne prezentis sin antaŭ la Tribunalo.

Male, ŝi sendis ĝentilan leteron al *kara juĝisto.* Ŝi aldonis, ke *mi volas eviti tiun indignindaĵon, mi ne deziras ricevi mokadon de la tuta homaro, ĉar mi nenion faris kiam mi estis 17-jaraĝa pri kio mi devas respondi nun kiam mi estas 96-jaraĝa.*

Estas necese memori, ke ekzistas ekscepto al la principo pri preskripto de deliktoj, tio estas la ĉeso de punebleco pro paso de difinita tempo. Tiel, la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintgaj Nacioj aprobis la Rezolucion 2391 (XXIII), de la 26-a de novembro 1968, pri la ne-preskripteco de milit-krimoj kaj gravegaj krimoj kontraŭ la Homaro, valida ekde la 11-a de novembro 1970. Laŭ tiu konvencio, ne ekzistas preskripto, sendepende de la dato kiam la agoj okazis, rilate:

- Militajn krimojn, laŭ difino deklarita de la Internacia Nurnberga Tribunalo en la jaro 1946.

- Gravegaj krimoj kontraŭ la Homaro, okazintaj ĉu dum milito, ĉu dum paca epoko, ekzemple: forpeloj pro milit-atako, genocido aŭ apartismo (rasa apartigo).

# *Vorto de la Semajno*

## **Abdiko** (laŭ PIV)

Ago, de tiu kiu abdikas.

## **Abdiki** (tr)

1) Formale demeti ĉiujn rajtojn pri reĝeco, imperiestreco, kaj simile.

2) Memvole forlasi altan oficon aŭ rangon.

*- En la jaro 2013 Papo Benedikto la 16-a abdikis en Vatikan-urbo.*
*- Post la revolucio la popolo abdikigis la reĝon.*
*- La oftaj disputoj kaŭzis la abdikon de la imperiestro.*
*- S-ro Ulo abdikis sian prezidantecon en la internacia kompanio.*



Abdiko de Napoleono en Fontainebleu en la jaro 1814

De la 6-a ĝis la 13-a de aŭgusto 2022 okazos en la kanada urbo Montrealo la **107-a Universala Kongreso de Esperanto**. Se Vi planas ĉeesti kaj Vi deziras prelegi pri jura temo, bv. kontakti kun **Internacia Jurista Esperanto-Asocio**:

**jurista@esperanto.ac**